

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

1976 3-4

KULTURAJ KAJEROJ

1976 MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Konstantino Brâncusi T. Macovei

Korinto

Kiuj energio-fontoj por la XXIa jarcento ?

Rajmundo Lullio, la iluminita doktoro E. Motillon

Rakonto por infanoj : Grajnoj de citrolo

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Niaj amikoj francaj kaj eksterlandaj, almenaŭ tiuj, kiuj jam vizitis la Kastelon, certe ŝatos la novajn plibonigojn faritajn en la Kulturdomo, ĉefe kiam ili scios ke la laboro estis grandparte farita de bonvolemaj sindonemaj ne profesiuloj. Ĉar fakte la rezulto situas sur nivelo multe pli alta ol la kutima rezulto de amatora laboro.

Dank al tiuj amikoj la vizitantoj ankoraŭ pli ol kutime ĝuos la grezijonan etoson. Tiuj vizitantoj estos verŝajne proksimume tiel multaj kiel la lastan jaron. Ankaŭ la sukceso kultura estos tiel granda. La prelegoj de la Internaciaj Semajnoj estos variaj kaj faritaj de aro ne de prelegistoj sed de fakuloj, kiuj ĉeestos la periodon same kiel la aliaj tiamaj Grezijonanoj. La prelegontoj ne estas altranguloj sed geamikoj de la ĉeestantoj. Tiamaniere estas tenata tiu fama amika etoso multe ŝatata de ĉiuj. Ĉiu preleganto parolos pri temo aŭ temoj plej konataj aŭ ŝatataj de li aŭ ŝi al amikoj kiuj ne hezitos fari demandojn kaj vigligi la diskutojn.

Restas ankoraŭ kelkaj ĉambroj por la lastaj du periodoj. Ne tro prokrastu vian decidon. Tuj petu informojn. Irante aŭ revenante de iu granda tutmonda kongreso, ne forgesu almenaŭ saluti la grezijonanojn survoje.

Ĝis baldaŭ !

Esperanto tra la Mondo ★

Ĉu rekorda nombro ?

Proksimume 125 esperantistaj manifestacioj (kongresoj, restadoj, internaciaj renkontoj, vojaĝoj) okazos en 1976. Tute nature, en nia moderna mondo, Esperanto estas ligita al internaciaj kontaktoj kaj turismo, kvankam diversaj kampoj ne estas ankoraŭ multe ekspluatataj, ekz. : studvojaĝoj por samfakuloj kaj vojaĝoj, kun internacia parto-prenantaro, por pli intime koni difinitan landon, kun tradukitaj intervjuoj de eminentuloj kaj respondeculoj de tiu lando, el la diversaj sociaj kaj kulturaj medioj. Kiu antaŭeniros sur tiu virga tereno ?

Por la somera fino...

— Internacia Kampadejo en G.D.R., apud Berlino, 5-18a de Septembro. Rilatu kun Centra Laborrondo Esperanto en K.L., Charlottstr. 60, D.D.R. - 108 - Berlin.

— Pupteatra Internacia Festivalo (P.I.F.), 22-28a de Septembro, en Zagreb kaj Sisak (Jugoslavio). Adreso : Pupteatra Internacia Festivalo, Internacia Kultura Servo, Amruseva 5/1, PF 499, 41001, Zagreb, Jugoslavio.

Kaj jam, pri la estontaj universalaj kongresoj !

1977 : Rejkjavik (Islando). De nun, la loka organiza komitato aktive laboras. La prezidanto estas Baldur Ragnarsson, lerneja inspektoro kaj jam vaste konata kiel esperanta poeto.

La kongresejo estos la universitato de Islando.

Dato : 30a de Julio - 6a de Aŭgusto 1977.

1978 : Varna (Bulgario).

1979 : eble Lucerne (Svisujo).

Aliflanke, la Someraj Universitataj Kursoj aranĝitaj en 1976 en la universitato de Antverpeno, antaŭvidas alian sesion en 1978 kun fakoj pri sciencoj kaj psikologio, por studentoj.

Por korespondi kun Japanujo

Jen la adreso : Japana Koresponda Servo, KLEG, Sone-Higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si 561, Japanio.

Ĉe la skoltoj

En Aŭgusto 1977, Skolta Esperanto-Ligo, kiu ricevis donacon havos eblecon eldoni kaj prezenti manlibron (unue en franca kaj angla lingvoj) pri internacia skoltado kaj internacia kunlaboro sine de la skolta movado.

Ĉiuj esperantistaj skoltoj, de iuj movadoj, estas invititaj kunlabori kun S.E.L. Adreso : J.K. Hammer, Pk. 433, NL - Zaandam 1400.

Kunveno de la orienteŭropaj esperanto-asocioj

Dum Aprilo, okazis en Krakovo (Pollando), la oka konsultiĝo de la reprezentantoj de la Esperanto-Asocioj de Bulgario, Ĉekoslovakio, Germana D.R., Hungario, Pollando kaj Sovetunio. La partoprenantoj pridiskutis i.a. kunlaboron de la landaj asocioj, la problemojn de la parlamenta, scienca kaj esplora agado.

En la bibliotekoj

— En Belgio, la esperanto-sekcio de la komunuma biblioteko en Kortrijk posedas jam 5.000 volumojn.

— En Urugvajo, la nacia biblioteko en Montevideo, kiu posedis jam multajn librojn pri aŭ en Esperanto, akceptis pli ol mil librojn, postlasaĵo de S-ro Menendez.

Grupiĝo de la kemiistoj

La kemia sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista estas refondita. La interesitoj estas petataj kontakti la sekretarion : S-ro A. Gonĉarov, P.K. 11, SU-656009, Barnaul-99 Soveta Unio. La prezidanto estas : Prof. D-ro S. Kawamura, 474-7 Kinasityo Huzii, Takamatu 760, Japanio.

Novaj eldonaĵoj

— « La nuda vero » de G. Salan. Franca deportito en germannazia koncentrejo rakontas siajn terurajn travivaĵojn...

— « Bakĥantinoj » de Eŭripido. La tragedio de la greka dramisto tradukita de la nun bone konata skota esperantista poeto A. Goodheir.

— « Vivo de Lanti », de E. Borsboom. Biografia studo pri la fondinto de S.A.T.

— Serio de « Esperanto-dokumentoj » eldonitaj de U.E.A. Por la klubaj bibliotekoj kaj informantoj pri la internacia lingvo. Aperas en Esperanto — kaj anglalingva paralelaj serioj. Ĉiu serio abonebla por 25 nederlandaj guldenoj por 10 numeroj.

— La kursotekstoj de la Someraj Universitataj Kursoj estas publikigitaj por kontribui al plivastigo de la scienca esperantlingva literaturo. La temoj estas tre diversaj. Informoj kaj mendoj ĉe : S.U.K., B.P. 9, B-4000 Liège 3, Belgio.

— El la multaj presaĵoj esperantlingvaj kiuj alvenas el Pekino, ni speciale notis du libretojn kiuj alportas interesajn informojn pri la nuna Ĉinio : « Dongtinga popola komunumo », « Kanalo ruĝa flago ».

Facilaj legaĵoj post la kursoj

Kiujn legaĵojn konsili fine de la kursoj al la partoprenantoj ? Grava demando. Ni sugestas, post la unuagrada kurso : « Karlo », « Amuzaj dialogoj », « Novaj Esperanto-historietoj », disketon « Internacia elparolo ». Post duagrada kurso : « Zamenhofa legolibro », « Rakontu Samideano », « Esperanta legolibro » de Migliorini.

Haltejo en Svisio

En La Chaux-de-Fonds (Svisio), la Esperantistoj povas malmultekoste ferii kaj ripozi 27-29 strato Postiers, en gastejo « Edmond Privat » kie estas instalita la sekretariejo de Kultura Centro Esperantista.


Instruado : kontaktoj serĉataj

Itala Esperanto-Federacio kaj Itala Instituto de Esperanto organizis seminarion pri la temo : « Klerigteknikoj kaj la instruado de la Internacia Lingvo en la bazlernejo ». Tiu temo estos studata dum unu jaro. Proponoj por kolektiva korespondado de infanaj klasoj, raportoj pri propraj spertoj, materialo, estos danke akceptitaj. Rilatu kun : Ligura Esperanto-Organizo, Via Biga 1/12, 1-16144, Genova, Italio.

En Budapeŝto

Dum Aprilo, en Budapeŝto, oni solene markis la dekan datrevenon de la esperanta fako ĉe la katedro pri ĝenerala kaj aplika lingvistiko en la universitato Elte. Pluraj eksterlandaj konataj esperantistoj kontribuis per referaĵoj.

Prof. Szerdahelyi gvidas la fakon.



Konstantino Brâncusi 1876-1957

Inter la homoj kiujn Unesko celebradas dum ĉi-tiu jaro, estas ankaŭ la skulptisto Brâncusi, unu el la fondintoj de la moderna skulptarto, kaj la plej fama reprezentanto de ĝi.

Li naskiĝis la 21an de Februaro 1876 en la vilaĝeto Hobita (prononcu Hobica) apud Tirgu-



bildo 1

Jiu, en la distrikto de Gorj (pron. Gorĵ), en Rumanio.



bildo 2

Li eklernis la arton en Craiova, ĉe la lernejo pri Arto kaj Metiartoj, kaj daŭrigis tiun studon en Bukareŝto, ĉe la Beletrista Lernejo. Tie, li havis kiel profesoron, Demetrion Paciurean Li konatiĝis kun la neoklasikismo pere de la artistoj Johano Georgescu kaj Vladimiro Hegel.



bildo 3

Dum la jaro 1904, Brâncusi forveturas al Parizo por perfektigi siajn artajn konojn, kaj tie definitive instaliĝas.



bildo 4

Dum pli ol kvardek jaroj, per pacienca laboro, lia « dia mano » (kiel diras Georges Selles) modeligas la argilon, skulptas la lignon, ĉizas kaj poluras la ŝtonon, aspirante ĉiam al pli sim-

plaj formoj. Tiel, li deziras atingi la esencon de la volumoj kiujn li sentas pli kiel iluzio ol kiel perceptebla kaj evidenta objekto.



bildo 5

Lia vasta verkaro komencas per la bone konataj infanaj kapoj modeligitaj el argilo dum la jaroj 1905 kaj 1906 (bildo 1), kaj per la « ekdormanta muzo » (bildo 2) kreita dum la jaro 1906, kies temo estas reprenita dum la sekvantaj jaroj. Poste venas la « tera saĝeculino » (bildo 3), la « kiso » (bildo 4) funebra monumento en la tombejo Montparnasse. Lia verkaro kulminas per « Majstra birdo » en 1912.



bildo 6

« Fraŭlino Pogan » en 1913 (bildo 5), kaj la tuta komplekso de Tirgu-Jiu : la « Senfina kolono » (bildo 6), la « Pordo de la Kiso » (bildo 7) kaj la « Tablo de la Silento » dediĉita de la artisto al la herooj mortintaj dum la unua mondmilito. Kelkaj el tiuj verkoj aspektas sub diversaj formoj, montrante la senĉesan aspiron de la artisto al perfekteco.

La verkaro de Brâncusi havas samtempe nacian kaj universalan karakteron. Liaj skulptaĵoj konstituas elstaraj elementoj por publikaj kaj privataj kolektoj en la tuta mondo. Krom tiuj kiuj troviĝas en Tirgu-Jiu, Bukareŝto kaj Craiova, la plej multnombraj skulptaĵoj de Brâncusi troviĝas en la muzeo Enggenhejm en Nov-Jorko, en la kolekto Arensberg eksponata en la muzeo de Philadelphia, kaj la kolekto John Quinn. La franca ŝtato omaĝis la grandan artiston, transformante lian laborejon, post lia forpaso, en memoraĵa muzeo, same kiel ĝi faris por Rodin.



bildo 7

Gravaj poetoj laŭdegas la verkon de Brâncusi : « ĉizante la lignon kaj la ŝtonon per siaj kamparaj manoj el Gorj, li trudis al la materio la spiritan fluidecon, li senbridigis el sia arda kerno la majstran birdon kaj la senfinan kolonon, malfermis al la arto kaj al la homa spirito la pordon de nova universo » (Geo Bogza). « La estontaj generacioj eble atribuos al li, super la arto de ĉi-tiu jarcento, influon egalan al tiu de Picasso » (Alastair Gordon).

Brâncusi donis, kiel neniu alia, artan esprimon al la profunde humanaj popolaj kaj naciaj fontoj, transdoninte ilin al la homaro tra sia propra lingvaĵo de puraj formoj.

Prof. Toma Macovei
Rumanio

KORINTO

La antikva Korinto situas en fekunda ebenaĵo, kie fontoj abundas ; ĝi etendiĝas piede de akropolo : estas la akrokorinto alta je 575 metroj. En neolotiko (5.000 ant. K.) triboj jam instaliĝis sur tiu akropolo. Sizifo, filo de Eolo, nomis ĝin Efira, kiu signifas : gardejo, observejo. Estas vere, ke ĝi jam estis eksterordinara strategia loko, ĉe kruciĝo de maraj kaj teraj vojoj. De tiu akropolo kia mirinda vidaĵo ! : okcidente jen la golfo de Korinto, la montoj Parnaso kaj Helikono ; sude, la montoj de Argolido, kaj oriente estas la golfo Saroniko kun siaj insuloj ; transe, jen Atiko, Likabeto kaj la Akropolo de Ateno.

Heros la Suno, estis la protektanto de la situo. Hera regis super la golfo de Korinto kaj Pozidono super la golfo Saroniko.

Invadantoj venintaj el Azio, ĉe bronzepoko, donis Efira al la ĉefo Korintos ; de tiam la akropolo nomiĝas Korinto. La invadantoj starigis templon honore al Afrodita, la sumera Iŝtar (diino de la Belo kaj Amo), kiu estos speciale kultita ĉi tie, laŭlonge de la jarcentoj.

En la micena epoko Korinto estis jam urbo brilanta, kiu lasis multajn postrestaĵojn : bronzajn figurojn kaj terakotajn vazojn.

La Dorianoj invadis la regionon 10 jarcentojn antaŭ Kristo. En —747 la Bakiadoj, oligarkio de teraj proprietuloj anstataŭigas Korintos. Estas la periodo dum kiu Grekujo elportas ekonomikan revolucion, el kiu ĝi eliras transformita ; la nobelaro estas tera nobelaro, kiu avidas pli kaj pli vastajn bienojn sur kiuj ili instaliĝas. Antaŭ la sklavigeco, kiu ilin minacas, la kampuloj preferas ekziliĝi. Komenciĝas grandaj migradoj, kiuj portas la grekan lingvon sur ĉiujn bordojn de Mediteraneo, precipe en Suditalio, en Sicilio kaj eĉ ĝis Provenco ; ili kreas koloniojn : Corcyre (Corfou) kaj Sirakuzo en Adriatiko, kaj Potide-o en Kalcidiko. Rapide, inter tiuj landoj nove helinigitaj, kaj la Patrujo ekzistas ampleksaj komercaj interŝanĝoj. Samtempe industrio naskiĝas ; la navigado iĝas malpli pereiga kaj la ŝipoj pli facile direkteblaj.

En —657 regas Kipselos kaj poste lia filo Periandre (625-585) unu el la sep Saĝuloj de Grekujo. Kontraŭ la krizo agrara kaj demografia li uzas maltimajn rimedojn : li devalutis la monon, malpermesis vendi sklavojn, disvolvis komercon kaj metiistan laboron (sed kia malbona edzo ! piedfrape li mortigis sian edzinon kaj li ekzilis al Corcyre sian filon, kiu ploris tiun morton). Por Korinto estas la periodo la plej prospera. La abundaj akvoj igas la regionon fekunda : vitoj, oranĝarboj, olivarboj kaj eŭkaliptoj por sorbi la akvon de la marĉoj kaj malaperigi la moskitojn ; la abunda argilo de la subgrundo akcelas la fabrikadon de la potaĵoj uzitaj, interalie, por la transporto de la parfumitaj oleoj, kiujn uzas la atletoj post la provoj. La Korintaj vazoj estas malgrandaj kaj dividitaj en larĝaj bendoj ; ĉiu el ili reprezentas homojn, bestojn kaj dekoraciajn plantojn. La metiista farado ebligas la komercon de la purpuro, de la luksaj lanaĵoj, de la tapiŝoj, de la vazoj, de la artaj bronzaĵoj.

Korinto, kiu situas egaldistance de Italujo kaj Azio, iĝas la granda, internacia, komerca centro de la antikvaj tempoj ; ĝi havas du havenojn, ambaŭ flanke de la istmo. La varoj elŝipigitaj sur unu flanko estas transportitaj aliflanken. Por helpi tiun transporton Periandre konstruigas la Diolkoson ; ĝi estis slabita vojo (pri kiu ni tuj parolos).

Korinto kreas ankaŭ novajn militajn ŝipojn : estas la triremoj, kun tri vicoj da remistoj ; soldatoj, peze armitaj, estas arigitaj en falangoj : ili estas la hoplitoj.

Tiam Korinto estas granda urbo, fama pro sia lukso, pro la malrigoriĝo de siaj moroj. Homero nomas ĝin « la riĉega ». Estas urbo kosmopolita kaj multekosta ; kiel diris la proverbo : « Ne ĉiuj povas vivi en Korinto ». La riĉaj komercistoj, la pasemaj navigistoj, kiuj ĝin vizitadas, altiras multegon da amoristinoj. Afrodita estas orientmaniere kultita de miloj da hetajroj, kiuj vendas siajn ĉarmojn je ŝia profito. La famaj lirikistoj Simonido kaj Pindaro ilin prikantis ; oni admiris ilian belecon, sed ankaŭ ilian kulturon kaj ilian spriton. Unu el ili Lais-a estis, oni diris, la amorantino de Diogeno ; la legendo aldonas, ke la Tesalianinoj, ĵaluzaj je ŝia beleco, ŝin murdis.

Diogeno, la cinika (—413-323) estis greka filozofo, konata pro sia kaŭstika spirito ; li malŝatis la honorojn, la riĉaĵojn, kaj ĉiuj socialajn decregulojn ; li preferis vivmanieron naturan kaj sobran ; nudpieda, envolvita en sia unika mantelo li dormis sub la portikoj aŭ loĝis en barelo, kiu famiĝis en la tuta Grekujo. La Granda Aleksandro, vizitanta Korinton, demandis Diogenon : « Kion, ci deziras ? » ; « Ke ci foriru de antaŭ mia suno » respondis la filozofo. Iun tagon li vidis infanon, kiu trinkis akvon el sia mano : « Tiu infano, diris Diogeno, montras al mi, ke mi ankoraŭ uzas superfluaĵon » ; kaj li ĵetis sian pelveton. Alian tagon li ĉeestis lekcionon de skeptika filozofo, kiu neis la movon ; Diogeno leviĝis kaj komencis marŝi. Platono estis definanta la homon « besto kun du piedoj kaj sen plumoj » ; Diogeno ĵetis meze de la aŭskultantaron kokon, kiun li estis senplumigita, kaj diris : « jen la homo de Platono ». Oni ankaŭ rakontas, ke, iun tagon, oni trovis lin en Ateno, ĉe tagmezo, kun lampo ĉe mano « Mi serĉas Homon » li diris.

Estas en Korinto la momento de la grandaj konstruaĵoj kaj de la belaj statuoj ; oni dediĉas

templojn al Hera, Hermeso, Heraklo, Pozidono kaj Apolono ; ĉe ilia tegmento aperas la frontono kun duobla deklivo kaj terakota dekoracio.

La templo de Apolono, starigita en — 540 sur antaŭa sanktejo de la sepa jarcento, havis rimarkindan planon, kiu jam anoncis tiun de Partenono ; ankoraŭ videblaj entranĉaĵoj en la roko montras tiun planon : jen la pronaos-o, la naoso, la opistodomo kaj kvadrata lokado por alia dio aŭ por gardi la sanktajn dekoraciojn ; la peristilo entenis 38 doriajn kolonojn, altajn je 6 metroj kaj el unu nura monolito.

Ve ! el ĉiuj belegaĵoj de Korinto restas nur 7 kolonoj, kiuj rezistis kontraŭ invadoj kaj seismoj.

Korinto havis siajn Istmajn Ludojn ; ili estis sportaj kaj muzikaj konkursoj ; la ditirambo de Dionizo akompanis procesiojn, dancojn, spektaklojn ; ĝi antaŭis Tragedion kaj Komedion ; la teatro de Korinto, konstruita en la kvara jarcento (ant. K) povis enteni 18.000 personojn.

La Agoro mezuris ĉirkaŭ 200 × 100 metrojn ; ĝi estis unu el la plej vastaj de Grekujo ; ĝi konsistis el du neegalaj partoj, sur malsamaj niveloj ; vico da butikoj ilin disigis ; meze de la agoro staris la tribuno, el kiu la guberniestro alparolis la ĉeestantojn ; estas el tiu tribuno, ke S-a Paŭlo riproĉis al la Korintanoj ilian diboĉon (Epistolo al la Korintanoj). La agoro estis randostarita de portikoj, kiujn kolonoj (74 doriaj kaj 34 ionikaj) subtenis ; magazenoj, hoteloj, kaj publikaj konstruaĵoj tie ĉi ŝirmiĝis. La slabita vojo, kiu venis el Lekaion malfermiĝis sur la agoro per momumentaj pordoj : ili estis triumfarkoj el marmoro, konstruitaj en la 1-a jarcento (P.K.). Super la propileoj staris du bronzaj kvadrigoj, plakitaj je oro kaj rajditaj de Helios kaj de lia filo Faetono.

Proksime de la agoro troviĝis aliaj monumentoj, kiuj datis de la plej antikvaj tempoj : La Sankta Fontano dediĉita al la orakolo ; La Fontano Pirene kaj La Fontano Glaŭke ; legendoj ilin akompanas.

La Fontano Pirene, uzita eĉ de antaŭ la 7-a jarcento, estis plurfoje rekonstruita, kaj ankoraŭ ekzistis en la Bizanca periodo. Herode Atticus ĝin ornamis per belaj statuoj. La legendo rakontas, ke Pirene, filino de Alcheloos, la dia riverego, transformiĝis en fontanon por senĉese plori la morton de sia filo, Kelkias, kiun la diino Artemisa akcidente mortigis.

La Fontano Glaŭke estis kavigita en la roko ĉirkaŭ je la 600 ant. K. La Romianoj ĝin ankoraŭ uzis. La legendo diras, ke Jazono revenis el Kolĉido, kie li konkeris la Oran-Felon kun la helpo de la magiistino Medea ; ambaŭ instaliĝis en Korinto. Sed la malfidela Jazono edziĝis kun Glaŭke, la filino de Kreono. Por sin venĝi Mede-a donacas al Glaŭke venenigitan tunikon. Por ke ĉesu sian teruran doloron la novedzino sin ĵetas en la fontanon.

La invado de la Romianoj okazigas la detruon de Korinto. La generalo Mummius incendias kaj fordetruas la urbon ; la viroj estas masakritaj ; virinoj kaj infanoj iĝas sklavoj ; la trezoroj estas transportitaj al Romo.

Dum unu jarcento Korinto estas morta urbo.

Sed en 44 ant. K, la Romianoj konsideras ĝin kiel kolonion kaj Julio Cezaro ĝin revivigas. Hadrien kaj Herode Atticus igas ĝin, por tri jarcentoj, unu el la plej prosperaj el la grekaj urboj. Belegaj konstruaĵoj estas denove starigitaj. La metiista industrio kaj la komerco denove prosperas. En la 3-a jarcento (P.K.) la teatro estas transformita en arenon kaj poste en basenon, en kiu oni organizas « ŝipajn batalojn ».



Apud la teatro oni konstruis « odeonon », kiu povis enteni 3.000 sidlokojn ; statuoj ĝin ĉirkaŭis. En la kristana periodo oni konstruis bazilikojn, kiuj enhavis statuojn de Cezaro, Aŭgusto kaj de iliaj familianoj.

En 267 Korinto estas denove rabdetruita de la Heruloj, Frankoj kaj Slavoj.

La Frankoj, la Normandoj, la Bizancanoj, la Maltaj Kavaliroj, la Venecianoj, sinsekve okupas Korinton pro ĝia fortreso sur la akropolo.

Kaj ankaŭ la Turkoj (1715-1821).

En 1858 - 1923 - 1930 seismoj detruis la urbon kaj la loĝantoj instaliĝis rande de la maro.

KIUJ ENERGIO-FONTOJ POR LA XXIa JARCENTO ?

En la jaro 2.000, la energio-konsumado triobligos aŭ eĉ kvinobligos, eĉ se oni sukcesas maksimume, malpliigi la malŝparadon. La mondo ĵus konsciigis, ke ĝi strikte dependas de la fosilhavaj tavoloj ; ĉar tiuj ĉi ne estas neelĉerpeblaj, oni demandas sin, kiamaniere la homaro kvietigos sian energio-soifon, en la komenco de la 21-a jarcento ; ĉu nukleo-energio ? ĉu hidrogeno ? ĉu brul-piloj ? ĉu suno ? ĉu tajdoj ? ĉu ruĝa karbo ?


Ruĝa karbo aŭ geotermiko

La ruĝa karbo abundas sed tamen troviĝas nur en privilegiaj lokoj. Oni esperas ĝin elterigi, eĉ per nuklea bombo, kaj in distribui sur la tuta planedo.

Tiel longe, kiel la Centro de la Tero (pli profunde ol 30 km.) estos varma, la geotermiko estos varmofonto, kiel suno aŭ akvo. Teorie geotermiko postulas simplan teknikon. Oni fosas truon direkte al la centro de la Tero ; oni konstatas, ke ĉiun 35 cm.-on la temperaturo altiĝas je UNU grado C. ; estas la geotermika grado ; sufiĉas verŝi akvon en la profundaĵon por produkti vaporon, kiun oni suprenigas por funkciigi turbinon ; oni povas ankaŭ suprenigi varman akvon, en varmizolitaj kondukiloj, por hejti niajn domojn.

La praktika realigo estas multe pli komplika kaj elspeziga ; ĉar borado de pli ol 3.000 m. profunden kostas ,laŭ la rokoj, inter 500 milionoj kaj unu miliardo de frankoj, al kiuj oni devas aldoni la koston de la varmizolado.

Unue oni uzis la geotermikon en la vulkanaj regionoj : tie la temperaturo de la tero estis sufiĉe alta ĉe la supraĵo kaj la fendoj sufiĉe multaj por ellasi varmajn akvojn kaj vaporojn. Jam en la antikvaj tempoj oni konis varmajn fontojn, gejzerojn kaj vulkanajn fumetojn. La Romianoj uzis la varmajn akvojn de Larderello, apud Florenco kaj tiujn de la Napolo-regiono en siaj termo-banejoj. Hodiaŭ Larderello havas geotermikan Centralon je 400 megaŭatoj.



Gejseroj de Kalifornio : 396 megaŭatoj

Por la hejtado, ankaŭ antikve konata, sufiĉis kapti la varmajn fontojn kaj ilin konduki en la bezonantan lokon. Dank'al la termika izolado, tiu hejtado funkcias eĉ en tre malvarmaj landoj. La loĝantoj de Rejkjavick, ĉefurbo de Islando, estas hejtitaj dank'al la najbaraj varmaj fontoj kaj gejzeroj pere de kondukiloj ne pli ol 16 km.-longaj. Por la urba hejtado 60-grada akvo sufiĉas. Oni ne bezonas profundan boradon, eĉ en ne vulkanaj regionoj. Tiel oni hejtas la Radio-Domon en Parizo kaj 2000 loĝejojn en la urbo Melun.

La borado-tekniko kaj la izolado-procedoj estas konataj. Necesas trovi la varmajn fontojn. Oni unue konsultas la historiajn arkivojn aŭ la popularajn legendojn, kiuj parolas pri varma fonto. Poste bona geologo scios detekti la subterajn akvajn tavolojn, kies temperaturo estas sufiĉe alta. La sedimentaj basenoj (en Francujo, tiuj de Parizo, Akvitanio, Rodano) taŭgas por la kreado de geotermika hejtado. La geologo serĉas la lokon, kie la subkuŝanta roko ne estas tro dura, kie la borado estos la plej profitdona. Por havigi akvon 50-grada sufiĉas bori ĝis 1.500 metroj (1.800 por la urbo Melun).

Geotermika elektro

La elektro-produktado, pere de la geotermiko estas tute malsama problemo. Por funkciigi turbinon oni bezonas vaporon kaj premon ; Konsiderante la koston de la instalado, oni devas esti certa, ke la vaporo-tavolo daŭros sufiĉe longe por amortizi la elspezojn. Tial, ĝis nun, la instalaĵoj estis raraj. Nune oni konas precipe Larderellon kaj la Gejzerojn de Kalifornio.

En 1847 ĉasisto de ursoj Grizzly, W. Bell Elliot malkovris tiujn gejzerojn, de tiam nomitaj « La pordoj de la Infero ». Tiu situo iĝis turisma loko, kiun vizitis, inter aliaj ,Ulysse Grant kaj Th. Roosevelt. Bedaŭrinde ĝia malproksimeco retenis la turistojn. En 1922 kelkaj pioniroj provis produkti elektron ; oni boris putojn, kiuj ellasis bonan vaporon ; oni alportis tubegojn kaj turbinojn ; oni faris provon. Bedaŭrinde la vaporo kaj la malpuraĵoj korodis la tubojn. Oni forlasis la projekton por fari hidroelektrajn baraĵojn.

En 1956 du kompanioj reprenis la unuan projekton. Oni denove boradis, oni alportis tubegojn el specialaj ŝtaloj kaj el aliaĵoj kapablaj rezisti al korodado.

En 1960 oni komencis konstrui la geotermikajn Centralojn. Hodiaŭ ili produktas 400 megaŭatojn kaj esperas atingi 600 megaŭatojn por liveri la kurenton al la urboj de la pli granda parto de la San Francisko-golfo. Ĉe la Gejzeroj de Kalifornio oni boras ĝis 2.000-3.000 metroj ; la temperaturo de la vaporo, kiu eliras, atingas 200-300 gradojn ; ĝi entenas proksimume 1 % de karbona dioksido kaj de sulfo-hidrogeno ne densigeblaj. Por elimini la rokerojn oni kondukas la vaporon en centrifugilojn ; por forpreni la polvojn oni faras lavadon per akvo ĉe la enirejo mem de la turbino ; ĉar oni eliminas la nocajn gasojn tiuj Centraloj ne estas poluciigaj. Novzelando, Meksikio, U.R.S.S., Japanujo, Islando ankaŭ havas geotermikajn Centralojn.

Certe la geotermikaj Centraloj pli kaj pli multiĝos. Oni kalkulis, ke tavolo 7.500-metra donas proksimume 7.500 megaŭatojn ĉiujare per m2. En Gvadelupo apud la vilaĝo nomita « La Bolanta » oni trovas, en la profundo je 300-450 metroj, vaporigeblan akvon, kiu atingas 240 gradojn C. kaj povas nutri Centralon 4 megaŭatan. Salvador, en vulkana regiono de centra Amerio, baldaŭ produktos sian tute bezonatan elektron dank'al geotermiko. Oni bezonas novajn teknikojn :

Oni volus uzi la vaporon, kies temperaturo estas sube de 200° C. Tiu vaporo servus por vaporigi fluidon kiel « isobutanon » kies bolpunkto estas pli basa ol tiu de akvo. La turbinoj estus pli malgrandaj kaj, ĉar « isobutano » estas pli densa ol akvo, ĝi havus malpli da etaĝoj.

Sed la plej grava novaĵo, kiu antaŭenpuŝus la geotermikon al la supro de la gloro, estus la uzado de varmaj rokoj ; sufiĉus sur ilin ĵeti malvarman akvon kaj rikolti la eliĝantan vaporon. Oni proponis du metodojn ; la unua proponas okazigi kavojn pere de subteraj atomaj eksplodoj. Sed kompreneble oni timas la uzon de la atomaj bomboj kaj ankaŭ la ŝokondojn kaj la skuojn, kiujn la bomboj povus okazigi. Plue oni ne estas certa je la profitdono de tiu novaĵo.

Por la serĉistoj de Los Alabamos (Nova Meksikio) oni povus rompi la fajrajn rokojn, kiel faras la petrolistoj pri la sedimentaj rokoj. Tio estos malfacila sed oni esperas grandan profiton (10-foje pli ol la ĝisnuna maniero). Longa rompo en granito proponus larĝan varman surfacon ; oni verŝus akvon, sub forta premo, sur la graniton, kiu estas netralasiva, kaj oni rikoltus la vaporon. Tiu metodo prezentas gravajn ĝenaĵojn : ĉu la granito donos sian varmon tiel facile, kiel la sedimentaj rokoj ? Kiel kondutos tiuj granito-fendoj, submetitaj al senĉesaj injektoj de akvo sub forta premo ? Ĉu tiuj fendoj plilarĝiĝos ? « Despli bone, diras kelkaj, la kontaktosurfaco estos pli granda kaj pli longedaŭra ».

Ĉu tiuj specialistoj-serĉistoj estas lerno-sorĉistoj, kiuj serĉas la plej bonan rimedon por duonigi nian planedon ?

Rajmundo Lullio, la iluminita doktoro

La vivo de tiu mezepoka scienculo kaj filozofo (Ramon Llull, en la gepatra Kataluna lingvo) estas vera romano, en kiu abundas strangaj okazajoj, kontraŭajoj, kaj misteroj. La kromnomo « Iluminita Doktoro » estis donita al li omaĝe al lia eksterordinara klereco, kaj al lia senegala mistika evoluiĝo. En nia epoko, lia verkaro fariĝas denove aktuala. Ekde kelkaj jardekoj, krom multaj artikoloj en kulturaj revuoj, pli ol dek libroj estis dediĉitaj al tiu geniulo. Ili estas verkitaj en franca kaj Hispana lingvoj, kaj almenaŭ unu en la Angla. Kelkaj el liaj verkoj estis reeldonitaj en la originala Kataluna lingvo, kaj tradukitaj france kaj hispane.

Rajmundo Lullio naskiĝis en Palma de Majorko en 1252. Li mortis en tiu urbo en 1316, Lia korpo estis « provizore » deponita en la kripto de la preĝejo Sankta-Francisko. En 1448 — do, pli ol unu jarcenton post lia morto, li estis oficiale sepultita en la absido, post beatigo fare de la Katolika Eklezio. Lia tombo ĉiam ricevas fervoran kulton de la Palmaanoj. En la urbo ekzistas grava societo por Lulliaj studoj. Ĝi eldonas periodan revuon, kaj studaĵojn pri la vivo kaj la verkoj de la filozofo.

HISPANIO DUM LA 13a JARCENTO

Tiam, la Ibera Insulo estis dispartigita en kvar reĝolandoj. La sud-orienta parto estis ankoraŭ okupata de la Araboj, ankaŭ nomitaj Maŭroj aŭ Saracenoj. Centre, Kastilio estis katolika reĝolando, de antaŭ nelonge liberigita de la Araba regado. Ĝiaj reĝoj luktadis ĝis la fino por la « Reconquesta », t.e. la plena kaj definitiva liberigo de Hispanio. Okcidente, ĉe la bordo de Atlantiko, Portugalio estis fariĝinta sendependa katolika nacio. Norde, la reĝolando Katalunio — Aragono konsistis, krom tiuj du provincoj, el la transpirenea provinco Rusiljono (Roussillon) kaj parteto de Landegvoko. Tiu lando estas ankoraŭ ofte nomata « Franca Katalunio » ; ĝiaj loĝantoj ankoraŭ parolas la Katalunan lingvon krom la Francan. Fakte, depost la krucmilito kontraŭ la Kataroj (1) tiu parto de la Aragona reĝlando estis regata de la Franca reĝo. Por kompensi tiun gravan perdon, la reĝo de Katalunio — Aragono konkeris la insulon Majorko, tiam posedata de la Araboj. Unu el la plej efikaj kunlaborantoj de la reĝo estis nobelo, Rajmundo Lullio, estonta patro de la filozofo. Rekompense, li ricevis vastajn bienojn en la insulo. Li sin establis en la ĉefurbo Palma. Tie naskiĝis lia unika filo, kiu ricevis la saman voknomon kiel sia patro : Rajmundo (Ramon).

LA JUNAĜAJ JAROJ

La infanaĝo de Rajmundo Lullio estis feliĉa. Liaj gepatroj estis liaj unuaj edukistoj. Ili instruis al li la rudimentojn, kaj la principojn de la katolika religio, ĝis lia 11a jaro. Tiam ili dungis pedaĝogon por sia filo. Tre komprenema kaj inteligenta, la knabo tamen tute ne estis studema. Li skribis en unu el siaj libroj : « Por min instrui kaj klerigi sukcesis nek la batoj, nek la punoj, nek la admonoj, nek iu el la rimedoj kaj ruzoj, kiujn oni provis kontraŭ mi ».

Kiam li atingis sian 14an jaron, Rajmundo fariĝis paĝio ĉe la Kortego de la reĝo de Katalunio. Tie li amikiĝis kun la du « infantoj » filoj kaj heredontoj de la reĝo, kiuj estis preskaŭ samaĝaj kiel li. La kortega frivola vivmaniero, kaj la princaj amikecoj ja pliigis lian orgojlon kaj dibonemon. Poste, li bedaŭris tiun periodon de sia vivo per tiuj vortoj : « Amanta Sinjoro ! estas strange, ke mia stulteco estis tiel granda ; ĉar mi pli pensis pri la parolo de la reĝoj kaj mondumaj homoj, kaj dediĉis pli da tempo al ĝi, ol al la Cia ; kaj mi pli laŭdis ĝin. Sed, ĉar, tio estas mala al la vero, mi nun estas plena de malvero ! »

Eleganta kavaliro, tre ŝatata de la virinoj kaj ilin tre ŝatanta, li estis ankaŭ vera trobadoro, praktikanto de la « Gaïa Scienza », la gaja scienco de la « amo ĝentila ». Li verkis ĉarmajn poeziojn kaj kanzonojn. Post sia konvertiĝo li detruis tiun tutan verkaron de junulo. En 1256, la reĝo nomumis sian duan filon Jacques (pr. : ĵak) (2) gubernatoro de Majorko, kaj Rajmundon Lullion senekalo kaj ĉefservisto de la princo. Sed li postulis, ke Rajmundo forlasu sian dibonan vivmanieron, kaj svatis lin al riĉa orfino. Ĉi tiu edziĝo naskiĝis du filoj. La pliaĝa ricevis la saman voknomon kiel sia patro kaj sia avo : Rajmundo.

Tamen la junulo rapide revenis al sia skandala vivo. Li entreprenis amindumon al nobla Sinjorino, Ambrosia de Castello, kies virta reputacio estis senmakula. Li sendadis al ŝi pasiplenajn poemojn, kiuj estis neresponditaj, escepte unu solan, kiu estis la lasta. En sia respondo Ambrosia postulis, ke li ĉesigu siajn ofendajn klopodojn, kaj ŝi aldonis tiujn enigmajn vortojn : « ... Forgesu pasion, kiu malnobligas vian nobelecon, kaj ne danĝerigu vian reputacion per tioma senvalorado ; ĉar se vi persistos en tiel malsaĝa projekto, mi estos devigata vin saĝigi, montrante al vi, ke la kaŭzo de via entuziasmo povas estis nur la kaŭzo de via malŝato ».

La sekvantan matenon, Rajmundo, rajdante sur la placo vidis Ambrosian enirantan la preĝejon. Li sekvis ŝin ; kaj enrajdis en la sanktan domon ! Oni povas facile imagi la skandalon !

LA KONVERTIĜO

Kelkajn horojn poste, Ambrosia dirigis al li, ke ŝi atendos lin dum la vespero. Rajmundo, entuziasmigita, ja zorgis ĉeesti la rendevuon. Sed, terura elreviĝo ! La Sinjorino, nudigante sian bruston montris du mamojn ronĝatajn de kancero ! Ŝi diris : « Jen vidu ! tiun vunditan belaĵon, putriĝantan antaŭ ol esti enfermita en la tombon ! Kaj tiu imago de vi mem kreita, tiel blindigas vian spiriton, ke ĝi forturnas vin for la sola beleco de Dio, eterna kaj superege perfekta !... »

La bato estis teruraga. Febrante, Lullio ne povis ekdormi. Dum la nokto li ricevis vizion de Kristo lin dolore rigardanta. Poste li konfesis, ke li jam havis kvar similajn sonĝojn, sed tute malatentis ilin. Tiu kvina vizio estis decidiga. Li decidis, ke de nun li tute dediĉas sian vivon al la servado al Dio. La morgaŭan tagon, li havis sesan vizion : la Sankta Virgulino sin montris al li, kaj ridetante prezentis al li Jesuon-Bubon.

De tiam, li profunde meditadis, kaj konkludis, ke li devas plenumi mision al li donitan : disvastigi inter la paganoj la religion de Kristo, kaj helpi al ties venko super la herezoj, la Islamanoj, kaj la Judoj. Elstudinte la problemon, li konvinkiĝis, ke sukceso ne estas akirebla perforte kaj milite, sed per voĉa propagando, kaj lojalaj pridiskutoj kun Islamaj kaj Judaj doktoroj. Kio, evidente, postulis longan intensan preparadon. Li studis la Araban Lingvon, perfektigis sian scion pri la Latina kaj Hebrea linvoj, kaj rapide mastris ilin.

Oni povas datumi tiun konvertiĝon proksimume je la jaro 1265a. Tiam, li estis aĝa pli ol tridek jarojn. Li rakontis tiun periodon de sia vivo en rimarkinda verko : « Libre de contemplacio », la Libro de Kontemplado.

LA VOJAĜOJ

Por plenumi siajn misiajn projektojn, Lullio fariĝis eksterordinara vojaĝisto en epoko, kiam vojaĝoj estis kostaj, penigaj, kaj danĝeraj. Unue, por akiri la necesajn mastrecon kaj klerecon. Due, por efektive propagandi en fremdajn landojn. Li travojaĝis preskaŭ la tutan jam konitan mondon.

